

MIA PREĜO

G. Boulanger / J. Kennedy -
Esperantigo: Emanuele Rovere

Post la fin' de l' krepusk', ne pepas plu birdetoj.

Ĉe l'komenc' de la nokt', jen vi en mia kor',

kaj ĝin vi plenigas dum mi por vi preĝas.

Mi preĝas kaj sentas vin kun mi, je la fin' de la tag',
en paradiza rev'.

Mia preĝo: ekstazo de l' ĉiel', dum la mond' estas for
kaj kun mi via kor'.

L'animoj niaj spiras kune ĉi nokte

kaj vi flustras la dolĉajn vortojn, kiuj ĝojigas min.

Mia preĝo kaj via la respond' daŭros same fidelaj,

ĝis la fin' de la vivo ni neniam disiĝos,

ene de mia preĝo. Mia preĝo!